

# La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache. | Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof.

Kosto por 1/2 jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 markoj 30 pfenigoj. (Por Rusujo — 1 rublo, por ĉiuj ceteraj landoj — 3 frankoj.) Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto (de ĉia lando), sed en tia okazo oni devas sendi per 20% pli multe ol la kosto nominala. Anoncoj po 1 marko por 1/32 de la paĝo.

Ĉio tuŝanta la gazeton „La Esperantisto“ (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, pago por la abonado k. e.) devas esti sendata al L. Zamenhof. (Adreso: Dr. L. Zamenhof à Varsovie, Russie).

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nurnbergo.

No. 3.

Nurnbergo, Marto 1891.

Jaro II.

## Pri la manieroj de vastigado.

Estas tute sendube, ke la plej grava laboro, kiun ni povas fari, kaj la plej granda utilo, kiun ni povas alporti al nia afero, estas — kiel eble plej multe disvastigi ĝin en la mondo. Ni povas eĉ diri, ke, almenaŭ por la unua tempo, sur tiun ĉi punkton devas esti turnita nia tuta atento kaj ĉiuj niaj penoj. Ĉar kion helpas nia tuta perfektigado kaj riĉigado de la lingvo, se ni ne penas antaŭe starigi ĝin sur tute fortaj piedoj kaj sufiĉe sendanĝerigi ĝian estontecon. Eĉ tuŝante la perfektigadon mem sinjorino Olga L. ankoraŭ en la pasinta jaro en bonega artikolo montris tute klare kaj nedisputeble, ke se nia lingvo nur estos sufiĉe disvastigita en la mondo, ĉio alia venos jam per si mem en la plej certa kaj bona maniero. Granda nombro da legantoj elvokos per vojo tute natura kaj sensubtena grandan nombron da aŭtoroj kaj eldonantoj; granda nombro da aŭtoroj donos rapidan riĉigadon kaj perfektigadon de la lingvo, kiel en ĉiu lingvo vivanta, kaj grandan elekton da tute kompetentaj homoj por estonta akademio aŭ io alia. Tial la plej grava celo de nia gazeto estos ĉiam zorgi pri la vastigado de nia lingvo, kaj la plej volonte ni akceptados artikolojn tuŝantajn tiun ĉi vastigadon. Ankaŭ de ni mem ni donados de tempo al tempo konsilojn tuŝante tiun ĉi saman objekton.

Ni havis jam la okazon rimarki, ke unu el la plej gravaj rimedoj por vastigi nian aferon estas konstanta parolado pri ĝi en gazetoj. La gazetaro en nia tempo ne senprave estas nomata la sesa regno potenca, kaj senlace ni devas ĝin devigadi kiel eble pli ofte tuŝadi nian aferon, ĉar nur tiam ni povas esperi pli aŭ malpli frue aligi al nia afero la grandegan indiferentan amason de la publiko. Se unu fojo ne prosperis, ni devas netimigite provi la duan fojon, la trian k. e.; se unu gazeto estas obstina, ni devas nin turni al alia gazeto; se ni ne povas paroligi la gazeton en unu formo, ni devas provi formon alian. Ni ripetos la peton, kiun ni esprimis en la pasinta jaro, ke la amikoj sendu al ni ĉiun gazetan numeron, en kiu estos io dirita pri nia afero, por ke ni povu ĝin sciigi en nia gazeto.

Sed ne ĉia gazeta artikolo estas egale fruktoporta; dum unuj artikoloj alportas al nia afero rondon da novaj amikoj, multaj aliaj, skribitaj nelerte, tute perdiĝas sen rezultato. Ni analizos tie ĉi kelkajn kaŭzojn, kiuj faras la artikolojn senfruktaj.

1. En gazetaj artikoloj ofte unu esprimo, eĉ unu vorto havas grandan signifon. Tiel ekzemple estas granda diferenco, ĉu oni parolas pri „nova lingvo“ aŭ pri „la nova lingvo“ (ĝustatempe, tie ĉi oni povas vidi, ke la artikolo „la“

ne estas tiel senutila, kiel kelkaj pensas). La plej granda parto de la publiko nenion scias ne sole pri nia lingvo, sed ankaŭ pri la ideo de lingvo tutmonda entute; ili memoras, ke ili legis de tempo al tempo en la gazeto X aŭ Y ion pri lingvo tutmonda, sed ĉu ĝi estis pri Esperanto, ĉu pri Volapük, ĉu pri ia alia lingvo — ili ne memoras. Legante nun en la gazeto Z novan artikolon pri „nova lingvo“, ili pensas, ke ĝi estas ia nove naskita, deka aŭ centa lingvo tutmonda; pensante, ke la artikoloj, kiujn ili de tempo al tempo legis, parolis ĉiu pri alia lingvo, ili kun ekkrio: „ankoraŭ unu nova lingvo tutmonda!“ ĵetas la gazeton, kaj la artikolo anstataŭ inklinigi ilin al nia afero ankoraŭ pli ilin malproksimigas de ni. Tion pli, ke ekster la du pretaj lingvoj, Volapük kaj Esperanto, efektive ofte aperas diversaj rapide bakitaj kaj rapide mortantaj projektoj kaj projektetoj, kiujn la gazetoj, ne analizante la esencon, kutimis prezentadi al siaj legantoj sub la nomo de novaj lingvoj tutmondaj. Tial se ni rakontas al la legantoj pri „nova lingvo nomata Esperanto“, ni subtenas ilin en ilia erara opinio, ke Esperanto estas „unu el la multaj lingvoj tutmondaj“; ni devas paroli al la legantoj pri „la (t. e. sendube konata, ofte priparolita) lingvo Esperanto“. Parolante pri nia lingvo, ni ne devas sen bezono paraleligi ĝin nek kun Volapük, nek kun la diversaj efemeraj projektoj, ĉar en la okuloj de la amaso, kiu kritiki ne scias kaj ne volas, tia paraleligado diskreditigas nian aferon, prezentante ĝin kiel „unu el multaj“.

2. Ni diris jam siatempo, ke parolante pri nia lingvo, ni devas ĉiam uzadi unu solan nomon „la lingvo Esperanto“, por ke la publiko kutimu je la nomo, ekmemoritu kaj ekrespektu ĝin kaj ne pensu, ke oni ĉiufoje parolas pri aliaj lingvoj. Tiel ekzemple ni havis jam mem la okazon vidi, ke unu gazeto, kiu jam kelkajn fojojn alportis artikolojn kaj sciigojn pri nia lingvo sub la nomo Esperanto, ricevinte unu belan matenon broŝuron portantan sur la titola paĝo la nomon „internacia“, ekkriis: „ankoraŭ unu lingvo tutmonda! kiam estos fino!?“ Tiel, dank' al alia nomo, broŝuro devanta batali por nia afero — kontraŭ sia propra volo batalis kontraŭ nia afero! La nomon, la nomon! Ĉiam tiun ĉi saman nomon! Ne forgesu kiel eble plej ofte ripetadi al la publiko la nomon de nia lingvo!

3. Parolante pri nia lingvo oni ĉiam devas proponadi ne akcepti ĝin, sed aligi al ĝi, oni devas paroli pri ĝi ne kiel pri nova lingvo, kiu volas nun serĉi al si amikojn, sed kiel pri lingvo jam praktike ekzistanta, disvastiganta, havanta jam multajn adeptojn en diversaj landoj, havanta jam sufiĉe grandan literaturon ĉiam kreskantan. La plej grandaj teoriaj laŭdoj sur la plejparton de la publiko ne efikas tiel frukto-

porte, kiel la rakontoj pri sukcesoj. Ni ne devas forgesi, ke por la plej prudentaj moralaj predikoj la mondo ĉiam restas absolute surda, sed rapide alflugas al Vi la mondo, se ĝi vidas, ke Vi havas sukceson. Por ni mem ni povas scii, ke nia laborado estas ankoraŭ tre malfacila kaj eble longe ankoraŭ postulados de ni feran paciencon; sed al la publiko ni devas ĉiam montri gajan vizaĝon. Ni ne devas mensogi, kiel faris la Volapükistoj, kiuj simple elpensadis grandegajn kaj gravajn faktojn, prenitajn tute el la aero; sed ni ne devas ankoraŭ forgesi, ke la homaro, por kies bono ni laboras, estas obstina malsana infano, kiu neniel akceptos sanigilon, se ni ne penos iom dolĉigi ĝian guston.

4. La artikoloj devas esti tiel skribitaj, ke la leganto, kiu ekinteresiĝis je la afero, ne vidu sin debarita de ĝi, sed havu la eblon tuj konatiĝi kun ĝi detale aŭ aliĝi al ĝi. En tiu aŭ alia formo ni devas montri al la leganto, kion li devas fari kaj al kiu kaj kiel li devas sin turni, se li volas sciiĝi detale pri la afero. Memorante, ke niaj verkoj en la plej multaj librejoj sin ne trovas, oni devas, rekomdante ian verkon, ĉiam montri klare, kie kaj per kia maniero la leganto povas ĝin ricevi. Aŭ la skribanto de l' artikolo povas doni sian adreson kaj proponi, ke ĉiu, kiu volas sciiĝi pri nia afero pli detale, povas sin turni al li. (Sur tiu ĉi loko ni ne povas ne turni la atenton de estontaj aŭtoroj de lernolibroj sur jenan cirkonstancan: la aŭtoroj de kelkaj lernolibroj malgraŭ nia peto en la „Aldono al la Dua Libro“ donis en sia verko nek la nomaron de nia literaturo, nek la sciigon pri la ĉiumonataj nomaroj de verkoj, kiuj tiam eliradis, nek la sciigon kion oni devas fari, se oni volas aktive aliĝi al nia afero; la verkoj venis en diversajn manojn kaj tie aŭ aliloke trovis eble amikojn, sed tiuj ĉi amikoj restis tute debaritaj de nia afero kaj forgesis ĝin, kaj ĝis nun nek ili scias ion pri nia afero, nek nia afero ion pri ili.)

5. Multaj artikoloj, anstataŭ paroli pure pri nia lingvo, sin okupas de la komenco ĝis la fino je komparado ĝin kun Volapük kaj prezentas nian lingvon ĉiam nur de unu flanko — de ĝia facila komprenebleco sen vortaro. Tio ĉi estas granda eraro; ĉar unue ĝi diskreditigas nian lingvon dank' al la cirkonstanco, ke la legantoj komprenas interne, ke senvortara komprenebleco por instruitaj homoj ne estas ankoraŭ kaŭzo por akcepti tiun aŭ alian lingvon; kaj due, se la legantoj efektive ellaboras al si iom post iom la opinion, ke la sola postulo de lingvo tutmonda estas ĝia plej granda komprenebleco por instruitaj homoj kaj neŝanĝiteco de la prenitaj vortoj, ili venos al juĝo tute erara, kaj per tiu ĉi erara batalilo poste batalos kontraŭ ni mem. Kaj se poste sinjoro Lott elskribos al ili tute sen ia ŝanĝo amason da vortoj el vortaro franca aŭ itala, aŭ D-ro Rosa en sia kelkpaĝa broŝureto „Nov Latin“, anstataŭ doni ion ellaboritan, simple proponos uzi la lingvon latinan sen formoj gramatikaj, — la legantoj timos, ke nun naskiĝis danĝeraj konkurantoj por nia lingvo. En la speciala batalo inter Esperanto kaj Volapük, kiuj ambaŭ estas lingvoj pretaj, pripensitaj, prilaboritaj, praktike elprovitaj kaj dank' al sia plej granda reguleco kaj facileco estas konformigitaj je la bezonoj de la publiko ne multelingva (ĉar homoj lingve instruitaj ja ne tre multe bezonas lingvon internacian), ni montradis, ke la lingvo Esperanto malgraŭ sia absoluta reguleco kaj facileco penis kion nur eble konservi la neŝanĝitan formon pe la vortoj. Tiu ĉi eco de nia lingvo ne apartenas al ĝiaj ecoj plej gravaj, kaj en la antaŭparolo al nia lernolibro ni parolis pri tiu ĉi eco nur kelkajn vortojn. Al la personoj, kiuj de la tempo de disputoj kun Volapük ellaboris al si la eraran opinion, ke por fari bonan lingvon tutmondan oni devas nur lasi la vortojn neŝanĝitaj, ne zorgante pri prilaborado, reguleco, facileco k. c. — ni povas proponi, ke ili prenenu la unuan trovitan vortaron francan, anglan aŭ latinan,

reprezu ĝin neŝanĝite kun ia laŭta titolo — kaj ili laŭ sia propra opinio havos la plej perfektan lingvon tutmondan, ĉar la lingvo franca, angla aŭ latina estas jam nun sen vortaro komprenata de la tuta instruita mondo multe pli precize ol ĉiuj efemeraj projektoj. La lingvo Esperanto estas kreita en la sekvanta maniero: estas prenitaj la plej konataj vortoj de la lingvoj ariaj kaj tre garde preparitaj tiel, ke ili alformiĝu al absolute regula gramatiko, ortografio kaj praktika uzebleco, kaj ke la vortoj kaj formoj ne venu en kolizion unu kun alia. Sed se Vi tiun saman materialon, kiun uzis nia lingvo, prenos kaj prezentos sub ia nova nomo en ĝia formo rudimenta kaj neprilaborita, — ĉu tio ĉi estos ia paŝo antaŭen? Se la aŭtoroj de la projektoj, anstataŭ rapidi kun la publikigado, farus antaŭe longajn kaj vastajn praktikajn provojn kun siaj projektoj, ili baldaŭ vidus, ke amaso da vortoj ne estas ankoraŭ lingvo kaj ke facila komprenebleco por instruituloj ne estas ankoraŭ tio sama, kio facila ellernebleco kaj senerara preciza uzebleco por la tuta mondo. Se la projektistoj, kiuj teorie prezentas al si la aferon tre facila, rigardas siajn projektojn serioze kaj volos provi doni al ili realan formon, ili baldaŭ vidos, ke inter enrigardi en densan arbaregon kaj inter sukcese traŭri ĝin estas ankoraŭ multaj grandegaj paŝoj, pri kiuj ili teorie ne sonĝis; kaj se ili eĉ havus sufiĉe da pacienco kaj se prosperu al ili al la nomo de sia projekto ellabori ankoraŭ sin teni povantan korpon, tiam ni povus diri al ili, ke lingvo, por kies ellernado oni devas antaŭe koni kelkajn plej gravajn ekzistantajn lingvojn kaj en kiu grandan nombron da vortoj, kiuj estas facile fareblaj el unu sama radiko, homo ne instruita devos lerni kiel apartajn vortojn, nur por ke la sufiksa ŝanĝiteco de la vortoj ne malplaĉu al instruituloj — tia lingvo en karaktero de arte farita lingvo estus simple ridinda, kvankam al personoj jam instruitaj ĝi je l' unua fojo eble ŝajnos „pli natura“, se ili pensas, ke la diversajn formojn devenantajn sen ia facila konstanta regulo de unu sama vorto ĉiu devas koni jam de sia tago de naskiĝo.

La aŭtoro de la projekto „Nov Latin“ diras, ke por lia „lingvo“ oni devas lerni nenan vortaron (La „Nov Latin“, pri kiu niaj amikoj eble legis en diversaj gazetoj kiel pri „nove kreita lingvo tutmonda“, estas nenio alia ol kelkpaĝa broŝureto enhavanta en si la projekton, ke oni skribadu per vortoj pure latinaj, uzante ilin kun artaj unuformaj gramatikaj finiĝoj, kiujn la aŭtoro proponas. Al tiu ĉi oni devas prenadi la vortojn ne en tiu formo, en kiu ili staras en la vortaroj, sed oni devas prenadi [proponu ĝin al la homoj ne konantaj la lingvon latinan!] la radikojn de la vortoj). Efektive lia projekto al kelkaj plaĉis, ĉar ili „komprenis en lia skribo ĉiun vorton“! (sed ili forgesis memori, ke ili mem estas instruitaj kaj konas la lingvon latinan, kaj tial estus mirinde, se ili ne komprenus ion skribitan per vortoj latinaj!). Ne parolante jam pri tio, ke la „Nova Latino“ ne povas fariĝi lingvo tutmonda pro tiuj samaj kaŭzoj, kiel la malnova latino (manko de komprenajoj nuntempaj k. c.), ni supozu por momento, ke ĝi portas en si la eblon fariĝi tutmonda, kaj ni tiam demandos la aŭtoron: por kiu tia lingvo servus? Homoj konantaj la malnovan latinon ne bezonas la „Nov Latin“; homoj ne konantaj la latinon eterne devos tenadi en la mano vortaron latinan kaj malgraŭ tio neniam povos uzi la novan lingvon. Anstataŭ teorie skribi projektojn, la aŭtoro provu devigi du personojn ne konantajn la malnovan lingvon latinan, ke ili korespondu inter si en la „Nov Latin“, kaj ankoraŭ antaŭ ol li eniros en la mezon de la arbarego kun la eterna kaj freneziga kolizio de vortoj kaj formoj, kun la baroj sur ĉiu paŝo, kun la rigideco de la materio k. c. — li jam eĉ l' unua paŝo inter la 2 korespondantoj ne konantaj la lingvon latinan vidos la jenan rezultaton: a) tiu, kiu skribos la leteron, trovante en la vortaro diversajn vortojn

kaj formojn sub simila signifo, farados blindan elekton kaj ankaŭ el la prenitaj vortoj li senkompetente kreados radikojn kaj skribos leteron tre humoran; b) tiu, kiu legos la leteron, havos rezultaton aŭ nenian, aŭ ankoraŭ pli humoran ol la ruso, kiu per helpo de germana vortaro tradukis al si la germanan frazon „ich weiss nicht wo ich meinen Stock gelassen habe“ — tute ĝuste laŭ la vortaro: „mi blanka ne kie mi pensi etaĝo trankvilanime havaĝo“. (Paroli tie ĉi kontraŭ nia propra intenco pli vaste pri unu el la proponitaj projektoj devigis nin la sekvanta cirkonstanco: kelkaj amikoj, leginte en gazetoj pri novaj projektoj kaj ne povante mem bone diferencigi inter teorio kaj praktiko kaj inter ŝajnaĵoj kaj veraĵoj, deziras, ke ni parolu en nia organo kontraŭ tiuj ĉi niaj „konkurantoj“. Por ke oni ne pensu, ke nia silento montras la bonecon kaj neatakeblecon de tiuj projektoj, ni parolis por ekzemplo pli vaste pri unu el ili, kaj de nun ni pri ĉiuj minute kreskantaj projektoj absolute silentados. Ni parolos nur tiam, se naskiĝus io, kio efektive enhavas en si ion gravan.)

Por nia afero mem la aperado kaj malaperado de tiaj unutagaj senenhavaj projektoj havas nenian signifon, se iliaj aŭtoroj eĉ dissendados ilin en la mondon en milionoj da ekzempleroj; sed ni volas nur averti niajn amikojn, ke per unuflankaj artikoloj ili ne sole elvokas la aperadon de tiaj projektoj, kiuj donante al si la nomojn de „lingvoj“ konfuzas la publikon kaj diskreditigas nian ideon, sed ni donas ankoraŭ al la neanalizanta publiko batalilon kontraŭ ni mem; ĉar montrante al la publiko interne ne ligitan amason da vortoj aŭ senkorpan teorion broŝureton, la projektistoj povas diri: „Vi scias jam el la artikoloj de la Esperantistoj mem, ke la plej granda kaj sola indo de lingvo tutmonda estas la komprenebleco de ĝiaj vortoj; nun Vi havas vortojn ankoraŭ pli kompreneblajn por homoj instruitaj, sekve nia lingvo“ (ankoraŭ naskota, kvankam havanta jam nomon) „estas multe pli bona ol Esperanto“. En bataloj specialaj ni povas laŭ la postulo de la cirkonstancoj meti pli grandan forton sur unu flankon de nia afero; sed parolante al la nenion scianta publiko, gardu Vin, amikoj, de unuflankeco!

6. Ofte niaj amikoj plendas, ke ili skribis artikolon pri nia afero, sendis ĝin fojon post fojo al diversaj gazetoj kaj ĉie trovis la pordon hermetike fermitan. En granda parto de tiaj okazoj la kulpo estas ne sur la flanko de la gazetoj, sed sur la flanko de la aŭtoroj mem, ĉar ili forgesis la simplan veron, ke ne la gazetoj ekzistas por niaj artikoloj, sed niaj artikoloj devas esti konformigitaj al la bezonoj kaj gustoj de la gazetoj kaj iliaj legantoj. Se la artikolo estas skribita de ia persono kun konata nomo aŭ signifa societa situacio, ĝi estas ofté akceptata pro la persono de la skribanto mem (en ĉia okazo la artikoloj devas ĉiam esti subskribitaj per plena nomo kaj adreso). Sed se la nomo de la skribanto ne estas allogo por la gazeto, la artikoloj neniam povas esti akceptataj, se ili estas simpla seka laŭdado de nia lingvo en formo havanta nenian intereson por la legantoj de la gazeto. Artikoloj talente skribitaj plaĉos al la gazeto kaj al ĝiaj legantoj eĉ tiam, se ili simple batalus por nia afero de punkto de vidadado pure Esperantista; gazetoj per si mem favoraj al nia afero akceptos ankaŭ artikolojn, skribitajn pure kaj videble en partiaj celoj de nia afero. Sed la plejparte artikoloj povas esti akceptataj de la indiferentaj gazetoj nur tiam, se ili estas skribitaj ne en blinda kaj nefundamentita persona entuziasmo, sed de neŭtrala punkto de vidadado de homo, kiu ne esprimas simple sian deziron kaj senton (ĉar personaj deziroj kaj sentoj neniun interesas), sed kiu prikskribas nur tion, kion li vidas, scias, aŭdas kaj konkludas, kiu ne en karaktero de flanka partiaĵo volas perforte altiri la legantojn al sia partio, sed en karaktero de kunlaboranto de la gazeto volas dividi kun ĝiaj legantoj la impreson, sub

kiu li mem sin trovas. Ne forgesu, ke la gazetoj ne volas esti rimedoj por sekaj partiaj celoj (kiel ili nomas nian aferon, se ili mem ĝin ne aprobas), sed memoras antaŭ ĉio pri la intereso de siaj legantoj kaj pri sia renomo de alportantoj de interesaj artikoloj kaj novaĵoj. La artikoloj devas esti ne sekaj, sed preparitaj kun certa saŭco, ĉar la eldorititaj stomakoj de la gazetoj ne amas sekan manĝon; kio en seka ripetita formo estis forĵetita kiel sengustaĵo, en certa nova saŭco estos akceptita kiel delikataĵo. Tiel ekzemple la artikoloj povas enhavi sciaĵojn historiajn, faktojn sciencajn, analizojn aŭ gajan humoron. La plej multe la artikoloj ordinare plaĉas al la gazetoj, se anstataŭ filozofadi, ili prezentas multon da novaĵoj por la legantoj; ĉar artikolojn reporterajn la gazetoj la plej volonte akceptas (precipe se la artikolo havas karakteron iom sensacian). Vi povas rakonti pri la stato de l' afero, detale pri ĝia literaturo kaj pri la apartaj verkoj, pri la kluboj kaj rondetoj oficialaj kaj neoficialaj, pri la korespondado inter personoj de diversaj landoj kaj nacioj, pri la konstruo kaj la spirito de la lingvo, doni ekzemplojn de prozo kaj versoj k. c. Lerta ĵurnalisto el la plej malmulta materialo kaj eĉ eĉ absoluta manko de statistiko komprenas prepari artikolon plenan je intereso por la legantoj.

Ekster artikoloj ekzistas ankoraŭ multaj aliaj vojoj por paroladi pri nia afero en gazetoj, ekzemple: korespondoj, folietonoj, rakontetoj, privata korespondado, demandoj elvokantaj respondojn de la redakcio en la rubriko de respondoj, anoncoj k. c. Tiel ekzemple se en tiu aŭ alia urbo homoj komencis interesiĝi je nia afero, oni povas alsendi korespondojn al gazetoj kaj inter aliaĵo rakonti, ke en tiu urbo laŭ la ekzemplo de aliaj urboj komenciĝis movo por la afero Esperanto, kaj ĉe l' okazo paroli pli vaste pri la tuta afero. Diversaj gazetoj, kiuj ĝis nun estis fermitaj por artikoloj pri nia afero, per sia propra iniciato, volante doni al siaj legantoj novaĵeton, donis sciigon pri la paroladoj de sinjoro Schmidt kaj pri la fondiĝo de la Munĥena klubo, kiam oni alsendis al ili eltranĉojn el aliaj gazetoj kun la diritaj sciigoj aŭ korespondoj. En folietonoj aŭ rakontetoj oni povas ĉe l' okazo tuŝi nian aferon. Unu gazeto, absolute malamika al nia afero, en sia poŝta rubriko respondis al unu demandanto, ke ĝi „ne apartenas al la entuziasmuloj por la lingvo Esperanto“, kaj tiel kontraŭvole, nomis nian aferon, kio jam estas pli bone, ol tio, kion la Germanoj nomas „todtschweigen“ (mortigi per silento). Malgranda anonco, kiel ekzemple: „la amikoj de la lingvo internacia Esperanto en nia urbo estas petataj alsendi siajn adresojn al N. N.“, aŭ en alia maniero, sian propran celon (eble nur pretekstan) kredeble ne atingos, kaj tamen ĝi turnos la atenton de multaj legantoj sur nian aferon.

Ekzistas multaj diversaj vojoj por eterne paroladi en gazetoj pri nia afero; sed 2—3 personoj nenion povas fari, kaj estas necese, ke ĉiuj Esperantistoj, ĉiu de sia loko de loĝado, ripete laboradu en tiu ĉi direkto, kaj ke la agitado estu konstanta kaj de diversaj punktoj. Nia laborado, aparte en la unua tempo, estas tre malfacila, kaj se ni volas, ke nia idealo pli aŭ malpli frue estu atingita, ni devas ĉiuj kutimi je la konvinkigo, ke ĉiu el ni devas esti energia kaj senlaca laboranto por la komuna celo kaj ne sole pasiva rigardanto kaj aŭskultanto, kiu volas nur ĉiam scii, kion oni faras. Ni devas reciproke al ni ĉiam helpadi kaj konsiligi, kaj tiel estus tre bone, se niaj amikoj subtenadus inter si regulan korespondadon (multaj jam nun ĝin faras)\*). Por plifaciligi tion ĉi, ni nun proponas, ke Esperantistoj, dezirantaj komenci korespondadon kun alibaj Esperantistoj, sendu al ni siajn

\*) La skribantoj de artikoloj devas dissendi po unu presita ekzemplero al siaj korespondantoj, por ke tiuj ĉi povu sendi la ricevitajn artikolojn al aliaj gazetoj aŭ en neŝanĝita presita formo, aŭ en formo prilaborita kaj aliĝita.

adresojn, kaj ni publikigados ilin en nia gazeto. La internacia korespondado inter diversurbaj kaj diversalantaj amikoj ankaŭ en aliaj flankoj sendube prezentos al la korespondantoj multan intereson. Ni faras nian proponon, kaj ni esperas, ke ĝi estos volonte akceptita kaj ke jam en la venonta numero ni havos la eblon doni diversajn adresojn en la rubriko „Personoj, dezirantaj korespondadi en Esperanto“.

## Artikoletoj.

Ni dividus kun niaj legantoj ankoraŭ kelkajn aliajn konsilojn, ricevatajn de niaj amikoj. Sinjoro A. Grabowski proponas fondi negrandan akcian societeton por eldonado de verkoj en nia lingvo. La propono estas tre bona, sed la sperto montris al ni, ke ne tiel baldaŭ ankoraŭ ni povos fondi ion similan; se ni nun volus ĝin provi, ni havus nur malagrablaĵojn kaj nenian rezultaton, tial ni ne prenas sur nin la iniciaton. Tamen ni presas la konsilon, ĉar eble aliaj amikoj de nia afero volos ĝin provi kaj estos pli feliĉaj ol ni atendas. — Li donas ankoraŭ la jenajn konsilojn: a) „Ĉiu disdonadu la libretojn (gramatikojn, vortarojn) sen ia propra antaŭparolo. Mi gajnis amikojn nur tiam, kiam mi donis, nenion parolante pri la enhavo, la libreton al la konato kaj aldonis nur: „Ne rigardu nun en la societo la libreton, kaŝu ĝin en la poŝon kaj poste, kiam Vi estos sola en Via ĉambro, tralegu kaj pripensu ĝin serioze“. Se ni donacas la libretojn publike en societo, tiam okazas tio ĉi: la plej malsaĝaj komencas tuj kritiki la unuan vorton, kiun ili tralegis, kaj kontraŭparolante kontraŭ la ebleco de tia afero, kiel lingvo tutmonda, ili deprenas per siaj ŝercoj la kuraĝon al la ceteraj. Se oni volas konvinki la amason, oni fariĝos nur ridinda en ĝiaj okuloj kaj nenion helpas al la afero. Mia konata instruistino de gimnazio, kiu mem ellernis la lingvon, rakontis al mi: „Mi prenis libreton kaj montris ĝin al la instruistoj-kolegoj en la konferenco. Oni komencis kritiki sensece kaj ridi je mi, tiel ke mi ne sciis kion respondi kaj kie min kaŝi“. b) „Estas afero ĉie konata, ke la plejmulto de homoj aĉetas libron nur tiam, kiam ĝi estas en librejo. Se iu el vilaĝo veturas urbon, li ofte ricevas tian komision: se Vi estos en la librejo, aĉetu por mi tian kaj tian libron aŭ abonu tiun kaj tiun gazeton. La peno skribi leteron, enmeti monon, sigeli ĝin per 5 sigeloj kaj sendi al ia librejo aŭ redakcio detenas multajn ankaŭ inter niaj adeptoj venigi presajojn en Esperanto. Tial mi konsilas, ke niaj amikoj kolektu la abonon pagon por nia gazeto inter siaj konatoj kaj amikoj kaj sendu al la redakcio mem la monon kaj la adresaron de la varbitaj abonantoj. Por ke la energiaj batalantoj sciu unu pri la alia, oni devas presadi nun ĉiam la nomojn de tiuj, kiuj per la supre montrita maniero gajnos por nia gazeto ne malpli ol 10 legantojn.“

(Sinjoro Grabowski mem faris bonan komencon kaj sendis al ni por la tuta jaro 1891 la abonpagon por 10 abonantoj, kiujn li varbis.)

La plej malforta flanko de nia afero estas tio, ke ĝis nun ni ne havas ankoraŭ eĉ unu riĉan homon, kiu povus subteni nian aferon materiale. La tuta nia afero ĝis nun kuŝas sur la ŝultroj de personoj, kiuj havas bonan volon sed ligitajn manojn kaj neniujn rimedojn. Dume nia afero por progresadi rapide postulas grandajn rimedojn. Oni devus dissendi en la mondon grandan nombron da lernolibroj kaj agitantaj broŝuroj, oni devus donadi anoncojn, eldonadi verkojn k. c. Estas tute sendube, ke se ni havus materialajn rimedojn, nia afero irus cent fojojn pli rapide. Tial ni petas niajn amikojn peni, kiom ili nur povas, altiri riĉulojn al nia

afero. Ankaŭ homoj kun konataj nomoj aŭ okupantaj gravan situacion en la societo estas por nia afero tre gravaj; kvankam jam nun inter la amikoj de nia afero trovas sin kelkaj personoj tre altaj kaj influaj, sed pro kaŭzoj nekompreneblaj al ni ili bedaŭrinde sin ĝenas ankoraŭ ne sole fari ion publike por nia afero, sed eĉ elmeti malkaŝe sian nomon. La plej grandan utilon al nia afero alportos tiu, kiu inklinigos por ĝi iun riĉulon, kiu volus preni sur sin la tutan materialan flankon de nia afero.

## La kapelo.

Supre staras sur la monto  
La silenta kapeleto;  
En la valo, ĉe la fonto,  
Ĝoje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado  
Nun eksonis tra l' silento, —  
Haltis knabo en kantado  
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto  
El la valo ĉiu venos.  
Ankaŭ vin, ho paŝtisteto,  
Oni iam tien prenos!

## Nokta kanto de soldato.

En nigra nokto tute sole  
Mi staras gardon senparole,  
Eraras for la penso mia  
Al mia domo familia.

Al la standardo fortiritu  
Ho kiom estis mi kisita...  
Mi tiam pensis kun malĝojo:  
Mi vidas Vin je l' lasta fojo!

Ho, dormu dolĉe, karaj miaj!  
Irante al la litoj Viaj,  
Vi nun per preĝo Dion gloras, —  
Vi certe ankaŭ min memoras.

La horo venis, gard' alia  
Stariĝos nun sur loko mia.  
Mi iras dormi tute laca,  
Mi vidos Vin en sonĝo paca.

Munĥeno, la 4a de Februaro 1891.

Estu al mi permesite paroli per tiu ĉi artikolo pri kelkaj punktoj, kiun mi trovis, traleginte la ĝis nun elirintajn verkojn internaciajn kaj nian gazeton „La Esperantisto“. Mi pensas, ke ne mi sola trovis ilin priparolindajn, sed multaj aliaj Esperantistoj eble konsentos je miaj pensoj. Antaŭ ĉio mi devas konfesi, ke mi vidas feliĉon en la malapero de la „Ligo“ — ĉar unue la tempo por fondi ĝin sendube estis tro frua, due la multegaĵo de proponoj pri la ŝanĝado de nia lingvo nur tro klare vidigis, ke la germana popoldiro „multaj kapoj — multaj sencoj“ parolas veron! Cetere ankaŭ kelkaj leteroj kaj poŝtaj kartoj, kiujn mi ricevis, min konvinkis, ke nia lingvo, kvankam estante facilega, tamen ne estas farita por homoj simplaj ne kutimintaj pensi „logike“; kaj mi preskaŭ ĉiun tagon vidas, ke eĉ personoj konantaj

aliajn lingvojn ne tute klare komprenas la estecon de lingvo tutmonda. Kiam, ekzemple, mi legis la esprimon „havu la bonecon kaj sendu al mi“, mi diris al mi, ke la tiel skribinto estas Germano, kiu la nacian econ de sia lingvo simple tradukis en Esperanto; des pli mi devis miregi, leginte en unu letero la germanan, vorton „vielleicht“ tradukitan „multfacile“(!). — En la Januara numero de l' „Esperantisto“ sinjoro J. Pučkovski diris: „La lingvo Esperanto estas ellernata sen instruanto“, — mi efektive bedaŭrus, se tiu ĉi opinio estus rigardata kiel aksiomo; la reguloj de ĉiu lingvo nacia estas aliaj, kaj tial ŝajnas al mi, ke la malfacileco de nia lingvo vere kuŝas en ĝia facileco! La lingvo Esperanto, estante farita por la uzado de ĉiuj popoloj civilizitaj, devas enhavi antaŭ ĉio la plej grandan simplecon de ĉiuj lingvoj naciaj, — sed tiu ĉi simpleco estas tute ne elernebla per si mem; almenaŭ nur lernanto bone konanta la lingvan logikon tuj povos uzi nian lingvon tiel, ke ia alilandulo ĝin facile komprenu! — Tial mi diras: la ĉefa afero por la vastigado de nia lingvo — se vere ĝi devos esti lingvo tutmonda — devos esti la estigo de plena gramatiko nacia - Esperanto! Mi tion ne diras sen forta motivo, neniel! Mi kontraŭe jam multfoje sciigis, ke tiu kaj tiu persono ne estis inklinata konatiĝi kun nia lingvo, ĉar ili ne volis peni tralegi niajn verkojn kaj per tio ĉi eltrovi la regulojn, sed ili min tuj demandis: ĉu ne ekzistas ia detala gramatiko? Tial mi mem entreprenis ellabori gramatikon germana-internacian, elirontan post kelkaj semajnoj, kaj mi kore deziras, ke tiaj gramatikoj estu farataj ankaŭ por aliaj lingvoj. — Mi konsentas, ke la ellaborado de plena gramatiko kaj plena vortaro estas objektoj kiel eble pli frue estigindaj! Kvankam la elirigado de tradukaĵoj kaj la grandigado de nia literaturo estus tre multe dezirindaj, tamen la unua afero ŝajnas al mi esti la kreado de gramatikoj kaj vortaroj. Volapük ne estis ankoraŭ ekzistanta unu jaron, kiam plena gramatiko jam estis eldonita, kaj la publika instruado sendube alkondukis al Volapük la plej grandan nombron da lernantoj. — Ellaborinte mian gramatikon, mi trovis punkton, kiu mian logikan sencan iel maltrankviligis: dum ĉio en la sistemo de nia lingvo estas klara kaj bone pripensita, mi des pli ne povas kompreni, kial la mirinda sistema regulo tuŝante la formigon de la pronomoj ne estas obeita en ĉiu okazo? Laŭ mia opinio la logiko en tiu ĉi punkto ne estas regnanta. La finiĝo de l' adjektivo ĉiam estas a; tial ĉiu pronomo uzata kiel adjektivo devas finiĝi je a. Kiam mi diras „dieser Mann“, la vorto „dieser“ klare estas adjektivo; dum en „Dieser ist reich“ la vorto „Dieser“ estas substantivo. Oni tial devus skribi kaj diri: „tia viro“ kaj „tiu estas riĉa“. Mi tute ne komprenas, kial ni estas devigitaj diri „tiu viro, tiu domo“? Nenia lingvo nacia konas tian uzadon! „Tia“ estas „solcher“; sed mi devas demandi: kial? „Solcher“ logike estas la formo adjektiva de „so“; tial „solcher“ devas esti „tia“, kaj „was für ein“ („welcher Art“) = kiela. Logike ni havos la vorton „solcher Art, auf solche Weise“ = „tiel“. Se estas permesite diri „nenia lingvo“, ni ankaŭ povas diri „ĉia lingvo“, kaj la formoj je „u“ restados nur por la uzado en senco persona. Tial ni diros: „Tiu estas riĉa“ sed „tia homo estas riĉa“; „jen du libroj, kian Vi volas“? sed „mi havas multajn librojn, kielan Vi volas“? — Mi scias, ke jam sinjoro de Wahl tiun logikan uzadon tuŝis en ia artikolo; sed mi poste nur legis, ke la iniciatoro de nia amata lingvo ne akceptas la uzadon de „tiela“ k. c., sed neniel nin sciigis, kial li ne povas akcepti? — Alian punkton mi trovis en la „Meza vortaro“. Estas grandega plibonaĵo en Esperanto kontraŭ Volapük, ke la sencoj de niaj vortoj ne diferencas per simplaj konsonantoj. Tial mi al mi permesas rimarki, ke la vortoj „trinki“ kaj „drinki“, „stuparo“ kaj „ŝtuparo“ al mi ŝajnas ne bone kreitaj. La Germanoj nur tre malfacile diferencigas

„t“ kaj „d“, „st“ kaj „št“. La germana „st“ en la komenco de vorto ĉiam estas elparolata „št“; multe pli malfacila al ni estas la diferenco de „t“ kaj „d“ en la komenco de vorto; kaj mi povas ĵuri, ke Germano neniam eltrovos parolan diferencan inter „trinki“ kaj „drinki“. Mi volonte uzados „trinkegi“ kaj al mi permesas proponi por „stuparo“ la vorton „skinumo“ aŭ „skinaĵo“. Ankaŭ la vorto „prenilo“ por „Zange“ al mi ŝajnas ne bona; mi pli volonte uzados „pinĉilo“; alie mi trovas, ke logike „viŝilo“ estas „Wischtuch“, Fegetuch“ (por purigi, ekzemple, plankon), dum mi proponas traduki la vorton „Handtuch, Serviette“ per „purigilo“, se ne „sektuko“ k. a. — Mi fine sciigas, ke miaj kritikoj kaj proponoj ne estas io alia ol simpla esprimo de mia opinio. Mi — laŭ la jam elparolata opinio de l' iniciatoro — la diritajn formojn en la estonteco uzados je mia propra respondeco. Sed mi jam vidigis, ke mi tute ne intencis esti leĝdonanto, — mia gramatiko ne enhavos iajn aliajn regulojn aŭ formojn ekster tiuj, kiujn D-ro Zamenhof mem eldonis kaj kiujn ni jam trovis uzitaj en liaj verkoj. L. Meier.

Kun la artikolo de sinjoro Meier, estro de la Societo Esperantista en Munĥeno, ni ĉesigas, almenaŭ por kelka tempo, la presadon de proponoj reformaj, kaj en la venonta numero ni donos nian propran opinion pri la proponitaj ŝanĝoj, pri iliaj principoj kaj manieroj de proponado kaj enkondukado. Tie ĉi ni nur ne povas nin deteni diri kelkajn vortojn pri la esprimoj „tiela“, „kiela“ .k. c., ĉar tiu ĉi demando estas levita jam kelkajn fojojn. Nian rilaton al la propono pri la diritaj formoj la estimata korespondanto komprenis ne en la ĝusta senco. Ni neniam havis la intencan forĵeti la formon „tiela“; ĝi estas kreita tute regule laŭla gramatiko kaj logiko, kaj ni ne sole ne havis kaŭzon ĝin forĵeti, sed ni eĉ ne havis kaŭzon rigardi ĝin kiel ia ennovaĵo. En nia presita literaturo ankoraŭ antaŭ la farita propono oni povas kelkfoje (kvankam malofte) renkonti la vortojn „kioma“, „tioma“, kiuj estas kreita tute laŭ tiu sama maniero, kiel „kiela“, „tiela“, kaj tamen nek al ni, nek al iu alia venis en la kapon diri, ke ĝi estas ia ennovaĵo, pri kies akceptado aŭ neakceptado oni devas konsiliĝi. Tiel same la formon „tiela“ ni ne sole ne malpermesis al aliaj personoj (kiel pensas nia korespondanto), sed ni mem sen la plej malgranda ŝanceliĝo ĝin uzas, se ni havas la okazon, kvankam la diferenco inter la senco de „tia“ kaj „tiela“ estas tiel malgranda, ke la okazoj por „tiela“ estos tre maloftaj (ekzemple: se brulas granda domo kaj la brulo estas stranga, jen hela, jen subite estingiganta por momento, jen saltanta k. c. — ni povus diri (kvankam ne necese): „ĉu vi vidis tiun brulon (= la brulon de tiu ĉi domo)? tian brulon (= tiel grandan k. c.) mi ofte vidas, sed neniam mi vidis brulon tielan (= tiamanieran). Sed sinjoro W. ne proponis, ke ni uzadu la formon „kiela“ en okazo de bezono, sed li simple ĉiam uzas la formon „kiela“ en la senco de nia „kia“; tio ĉi estas jam reformo, kiun ni vere al neniu malpermesas, kaj kiun ni en formo de projekto volonte estus prezentaj en nia gazeto, sed kiun ni mem subite enkonduki praktike en nia gazeto ne povas sen gravaj motivoj; ĉar se ni volus ĉiun proponitan reformon blinde tuj efektiviĝi en la diversaj artikoloj de nia gazeto, la gazeto prezentus baldaŭ tian babilonan miksaĵon de stiloj, ke la legantoj devus ĝin kun kolero forĵeti. La stilo de nia gazeto devas esti modela, pura kaj unuforma, kaj se ni eble iom post iom enkondukos kelkajn ŝanĝojn, ni faros ĝin nur singarde, ne en apartaj artikoloj, sed en la tuta gazeto, kaj memorante la malutilecon kaj danĝeron de ĉia rompado, ni enkondukados paŝo post paŝo nur tiajn ŝanĝojn, kiujn ni trovas efektive gravaj kaj necesaj. Sed en la formoj „tiela“, „kiela“ (ĉiel-a!) ni tian necesecon ne vidas; ĉar se „tiela“ devas havi tute tian saman signifon kiel „tia“, kio do devigas

nin sen grava bezono enkonduki rompado (t. e. vekoj la hidron de multekapeco) por anstataŭ la jam ekzistanta kaj uzata vorto dusilaba doni vorton trisilaban? Farante tion ĉi oficiale en nia organo, ni ne sole sen bezono devigus la amikojn kutimi je nova formo, sed ni donus ankaŭ tre malbonan ekzemplon, kaj baldaŭ oni prave povus postuli, ke ni uzadu „tiutempe“ anstataŭ la „senfundamenta“ formo „tiam“, „tiumombre“ anstataŭ „tiom“, kaj eĉ la vorto „tiela“ mem, kiu elvokis la tutan malordon, baldaŭ devus pereci kaj cedi sian lokon al multe pli „logika“ formo „tiumaniera“ kaj tiel plu, sen fino, sen limo! Kaj anstataŭ la tuta montrita malordo kaj malutilo kian utilon la formo „tiela“ alportus? Absolute nenian! Ĉar se la sencoj devas resti tiu sama, la ekstera formo de „tia“ estas ja ne malpli oportuna ol „tiela“. Nia pasintjara gazeta respondo al sinjoro W. estis ne malaprobato (kiel eble kelkaj erare komprenis) sed nur klarigo de nia propra rilato al la diritaj formoj.

En la artikolo de sinjoro Meier samtempe estas tuŝita alia demando, jam multe pli grava: ĉu la signifoj de „kiu“ kaj „kia“ estas klare limigitaj kaj ne prezentos malfacilaĵon por multaj uzantoj. Tiu ĉi demando estas jam afero tute alia, havas signifon pozitivan, kaj pli aŭ malpli frue ni revenos al ĝi.

Artikolojn parolantajn pri reformoj ni ĝis hodiaŭ donadis sen ia rimarko de nia flanko, ĉar por ĉiuj faritaj proponoj ni rezervis de nia flanko komunan ĉirkaŭrigardon kaj konkludon. Hodiaŭ ni faris escepton nur tial, ĉar la tri fojojn ripetita propono pri „tiela“ povus doni al ĝi en la okuloj de multaj legantoj ian eksterordinare gravan signifon. Ni petas pardonon, ke ni okupis tiel multe da loko per afero eble ne interesa, sed ni volis unu fojon montri, al kia senutila kaj enuiga perdo de tempo ĝi kondukus, se ni volus pri ĉiu plej malgranda propono ne sole vaste paroli en nia gazeto, sed detale klarigi la motivojn, kial ni ĝin ne efektivigas en nia gazeto. Uzante la okazon, ni nun ankoraŭ unu fojon ripetis, kion ni jam diris en alia loko: en sia propra verko aŭ en sia privata korespondado ĉiu povas uzi kian stilon li volas (kvankam ankaŭ tie ĉi, pro la bono kaj unueco de nia afero, estas tre grave, ke oni deflankigu de la komuna stilo nur en okazoj tre gravaj kaj multe pripensitaj); aprobi tiun ĉi aŭtoron aŭ ne — estos la volo de la legantoj, kaj nia afero de tio ĉi ne dependos. Sed se en nia gazeto, kiu estas forte ligita kun la tuta sorto de nia afero, kaj en kiu la plej granda parto de niaj amikoj vidas modelon de stilo Esperanta, ni volus facilanime, sen interna persona konvinkigo kaj sen longa matura pripensado ĉiutage kaj sur ĉiu paĝo uzi alian stilon, — tiam nia afero estus ridinda kaj baldaŭ pereus. (Reformojn, kiujn ni persone ne aprobas, ni akceptos en la „Esperantiston“ nur tiam, kiam montriĝos, ke la plej granda parto de la privataj aŭtoroj ilin senkondiĉe aprobas kaj uzas). Se ni presadus ĉiun artikolon en alia stilo, la aŭtoroj de la reformitaj artikoloj mem baldaŭ superĵetus nin per insultoj, ĉar la danĝeron kaj ridindecon de multekapeco malpropra ĉiu facile vidas, dum la multekapecon enportitan de li mem ne ĉiu facile vidas kaj volas oferi al la komuna bono. Por ne reveni jam pli al tiu ĉi senutila parolado, ni ripetis nun unu fojon por ĉiam, ke ĉiu, kiu alsendas al ni artikolon, devas antaŭe esti preparita, ke la stilo en la artikolo estos glatigita konforme je la komuna stilo de nia gazeto.

La redakcio.

## La batalo de l' vivo.

Rakonto de Charles Dickens.

(Daŭrigo.)

Tia estis la eksteraĵo kaj vestoj de Clemency Newcome, kiun oni suspektadis, ke ŝi senkulpe falsigis sian propran

nomon Klementino (sed neniu sciis ĝin certe, ĉar ŝia surda maljuna patrino, vera mirindaĵo pro la alta aĝo, kiun ŝi atingis, kaj kiun ŝi subtenadis preskaŭ de sia plej frua infaneco, estis mortinta, kaj aliajn parencojn ŝi ne havis). Ŝi estis nun okupita je la kovrado de la tablo, kaj de tempo al tempo ŝi haltadis, metante la ruĝajn brakojn unu sur la duan, frotante la kontuzitan kubuton per la mano de la dua brako kaj tre trankvile rigardante la ambaŭ brakojn, ĝis ŝi subite ekmemoris ion, kio ankoraŭ mankis, kaj tiam ŝi forkuris por ĝin alporti.

„Jen venas la du advokatoj, sinjoro!“ diris Clemency en tono ne tre favora.

„Aha!“ ekkriis la doktoro kaj iris al ili renkonte. „Bonan matenon, bonan matenon! Kara Grace! Marion! Jen estas sinjoro Snitchey kaj sinjoro Craggs. Kie estas Alfred?“

„Li kredeble baldaŭ venos, patro“, diris Grace. „Li havis tiun ĉi matenon kun la preparado al la forveturo tiom da laboro, ke li jam tuj post la leviĝo de l' suno sin levis kaj eliris. Bonan tagon, miaj sinjoroj!“

„Bonan matenon, niaj sinjorinoj“, diris sinjoro Snitchey, „por mi kaj Craggs —“ tiu ĉi salutis — „bonan matenon, fraŭlino“, li diris al Marion — „mi kisas al Vi la manon“ — kaj tion ĉi li efektive faris. „Kaj mi deziras“ — vere vidi ĝin sur li oni ne povis, ĉar je l' unua rigardo oni ne povis supozii en li tre multajn bonajn dezirojn por aliaj homoj — „ke tiu ĉi feliĉa tago cent fojojn revenu“.

„Ha, ha, ha!“ ridis meditante la doktoro, tenante la manojn en la poŝoj: „La granda farso en cent aktoj!“

„Vi ja certe ne povas deziri, doktoro Jeddler“, diris sinjoro Snitchey kaj metis malgrandan bluan aktopaperujon al la tablo, „ke la granda farso por tiu ĉi aktorino estu mallongigita?“

„Ho ne“, respondis la doktoro. „Dio nin gardu de tio ĉi! Ŝi vivu kaj ridadu pri tio ĉi kiel longe ŝi povas ridi, kaj poste ŝi diru kun tiu franco: „La komedio estas finita, faligu la kurtenon.“

(Daŭrigo venos.)

## Novajĵoj.

La firmo „Friedr. Korn'sche Buchhandlung“ en Nurnbergo eldonis en la lingvo Esperanto la dramon de unu alta aŭtoro, tradukitan de V. V. de Majnov kun la permeso de la aŭtoro (Renaskita Manfred, dramo en tri aktoj de K. R. Tradukis V. V. de Majnov. Nürnberg, Verlag der Friedr. Korn'schen Buchhandlung. 1891). La originalo estas skribita per versoj, sed por ne ŝanĝi la tekston de la originalo la traduko estas farita per prozo. La traduko estas trarigardita de L. Zamenhof. Ni rekomendas tiun ĉi verkon al la amikoj de nia lingvo.

Sinjoro L. Meier skribas al ni, ke dank' al lia peno nia gazeto sin trovas nun en la ĉambroj de legado de la sekvantaj societoj en Munĥeno: „Akademische Leschalle“, „Museum“ kaj „Merkur“. Li ricevis la permeson havi publikan paroladon pri nia afero en la societo „Merkur“ en Munĥeno.

Por la celoj de nia afero L. Zamenhof ricevis de D-ro D. Marignoni el Crema 2 rublojn 58 kop.; per sinjoro Schmidt L. Zamenhof ricevis: de s-ro J. Puĉkovski — 1 rublon 75 kop., de s-ro Savicki 75 kop., de s-ro Milĉevski 50 kop., de s-rino Ĉerepanov 50 kop., de s-ro Poljakov 50 kop. — Kune kun la antaŭe ricevita (turninte la milrejsojn en monon rusan) ĝi faras 30 rublojn 8 kopekojn.

La antaŭ nelonge fondita societo Esperantista en Munĥeno

laboras por nia afero kun energio, kion estus al ni tre agrable vidi ankaŭ en la aliaj rondetoj de nia afero. La nombro de la membroj pligrandiĝas. La societo subtenas vastan korespondadon kun multaj niaj amikoj en diversaj landoj, donas anonecojn en diversaj gazetoj, sendas al gazetoj sciigon pri sia fondiĝo kaj ankaŭ artikolojn pri nia afero. La societanoj komencis instruadon de nia lingvo, kaj por la celoj de la instruado la estro de la societo eldonis metodon lernolibron. Por la korespondado ili uzas speciale presitajn poŝtajn kartojn, kiuj portas en la lingvo Esperanto supre la superskribon: „Reĝolando Bavarujo. Poŝtkarto“ kaj sur la 2 flankaj randoj: maldekstre — „La lingvo internacia Esperanto“, dekstre — „Progresado estas vivo, starado estas morto“. Al la fondiĝo de la klubo Munĥena alportis sian fratan helpon ankaŭ la klubo Esperantista en Nurnbergo, sendinte al la Munĥenanoj sian deputaton. Ĉiu, kiu volas korespondadi kun la Societo Esperantista en Munĥeno, povas adresi siajn leterojn aŭ poŝtajn kartojn al la estro de tiu ĉi societo: „Al sinjoro L. E. Meier, Augustenstrasse 89/III 1., München“.

La 26an de Januaro sinjoro Chr. Schmidt havis kun bona sukceso publikan paroladon pri nia afero en la „Turn-Verein“ (klubo gimnastika) en Nurnbergo. La rezultato de tiu ĉi parolado estis tio, ke jam kelkajn tagojn post la parolado sinjoro Schmidt komencis la instruadon de nia lingvo al 30 membroj de la dirita societo.

Sinjoro L. de Beaufront el St. Sulpice (Francujo), kiu longan tempon laboris super propra sistemo de lingvo tutmonda kaj nun apartenas al la plej varmaj amikoj de nia lingvo, preparas poŝan lernolibron de nia lingvo por Francoj (laŭ la modelo de nia rusa lernolibro No. 41).

En la lasta tempo la sekvantaj gazetoj parolis pri nia afero: „Revista del Ateneo Caracense“, X, XI 1890 (artikolo de volapükisto pri la lingvo Esperanto); „Augsburger Abendzeitung“ No. 346 kaj No. 352 (ambaŭ alportis anoncojn pri la tiam intencita fondo de la klubo Esperantista en Munĥeno); „Münchener Fremdenblatt No. 10 kaj 16, „Neues Münchener Tageblatt“ No. 10, „Bayerischer Kurier“ No. 9, „Neueste Nachrichten“ No. 12, „Neue freie Volkszeitung“ No. 7, „Bayerischer Landbote“ No. 2, „Fränkischer Kurier“ No. 7, „Augsburger Abendzeitung“ No. 6, „Generalanzeiger“ No. 5, „Pfälzische Volkszeitung“ No. 13, „Schwäbischer Merkur“ No. 11, „Berliner Tageblatt“ No. 33 kaj „Nowosti“ (S. Peterburgo) No. 26 (sciigo pri la fondiĝo de la societo Esperantista en Munĥeno kaj pri la lingvo Esperanto); „Neues Münchener Tageblatt“ No. 18, „Bayerischer Landbote“ No. 3 kaj No. 4, „Göteborgs Handels- och Sjöfarts-Tidning“ (Svedujo) No. 259, „Fosterlandet“ (Stockholm, Svedujo) No. 48 — (artikoloj pri la lingvo Esperanto); „Badische Landeszeitung“ No. 28 kaj „New-Yorker Staatszeitung“ (Ameriko) — pri la parolado de sinjoro Schmidt en Nurnbergo. — Al niaj estimataj amikoj, sinjoroj Halle, Kahn, Meier, Runstedt kaj de Wahl, kiuj alsendis al ni la supre diritajn gazetojn, ni esprimas nian koran dankon.

Lernolibrojn de nia lingvo en la lasta monato venigis: s-ro Beaufront el St. Sulpice — 15 lernolibrojn ( $\frac{15}{2}$ ); s-ro Bogoslavski el Šabo — 10 lern. ( $\frac{10}{41}$ ); s-ro Halle el S. Peterburgo — 25 lern. ( $\frac{25}{41}$ ); s-ro Hübert el Aleksandrovska — 25 lern. ( $\frac{25}{41}$ ); s-ro Pogorilko el Kiev — 13 lern. ( $\frac{13}{41}$ ); d-ro Radčenko el Konstantinograd — 10 lern. ( $\frac{10}{41}$ ); s-ro Schmidt el Nurnbergo — 100 vortaretojn ( $\frac{100}{6}$ ); s-ro Zambrzycki el Janow — 25 lern. ( $\frac{25}{41}$ ); s-ro Zinovjev el Poltava — 117 lernol. kaj 84 vortaretojn ( $\frac{110}{41} + \frac{7}{3} + \frac{84}{6} - 10$ ).

El Nurnbergo. No. 1 de la Esperantisto jam sciigis, ke rondeto baldaŭ estos fondita de membroj de la komerca societo „Merkur“ en Nurnbergo sub la nomo „Internacia klubo de korespondado“. Nun la dirita klubo estas fondita. Ĝi havas la celon praktike montri, ke la lingvo Esperanto estas la plej oportuna rimedo de komprenigado por ĉiuj komunikigoj inter personoj de diversaj nacioj en la tuta mondo. Tiun ĉi celon la subskribitaj esperas atingi per la energia kunlaborado de niaj amikoj en ĉiuj landoj de la tero. Jam multaj personoj atentigitaj per la referato de multego da gazetoj germanaj pri la publika parolado de s-ro Chr. Schmidt en la komerca societo „Merkur“ en Nurnbergo aliĝis al la fondiĝo „Internacia klubo de korespondado“ kaj komencis korespondi kun ĝiaj membroj. Por fariĝi membro de la dirita klubo estas sufiĉe sendi sian adreson al la sekretarejo de la komerca societo „Merkur“ en Nurnbergo.

Kun kora saluto internacia ni subskribas altestimante en la espero ke oni volonte helpos nian entreprenon.

Ebersberger, Friedrich, komercisto,	Hübnersplatz 1.
Schmid, Hans,	Albrecht Dürerstr. 4.
Uebelein, Christoph,	Tucherstr. 49/11.
Ebert, Alexander,	Jakobst. 16.
Dumpert, Georg	Königsstr. 53.
Lutz, Wilhelm	u. Baustr. 16.
Hirschmann, Carl	Köhnstrasse 24.
Schmidt, Franz,	Wurzelbauerstr. 24.
Wagner, Hans	Karlsstr. 19.
Dettling, Oskar,	o. Turnstr. 31.
Plazotta, L. Anton	Tucherstr. 24.
Zentner, Heinr.,	Adlerstr. 7.
Morg jr., Hans	Theresienstr. 16.
Breitschopp, L.,	Tunnelstr. 14.
Goelkel, Charles,	u. Kreuzgasse 2
Schmidt, Julius,	Marienstr. 12.
Schmidt, Arthur Ludwig,	Josephsplatz 2.
Müller, Peter	Sturmstrasse 8.
Kreisle, bei Hull & Cie.,	Adlerstrasse.
Lehr, Friedrich,	Ludwigstr. 79/IV.

## Respondoj al la amikoj.

Al s-ro R—i. Estus tre bone, se Vi donacus po unu aŭ po kelkaj lernolibroj de nia lingvo al la kluboj aŭ societoj, kiuj ekzistas en Via urbo, kaj se Vi zorgus, ke la lernolibroj kuŝu sur la tabloj en la legejoj de tiuj ĉi kluboj. Tion ĉi saman estus bone fari ankaŭ kun la bibliotekoj.

Al s-ro K. en Dinaburgo. Ekster la respondo letera, ni poste donos al Vi ankaŭ pli vastan respondon en nia gazeto. La respondoj en la gazeto havas karakteron ne personan, sed komunan; tial respondinte al la demandanto mem per mallonga poŝta karto, ni ofte, se la demandata objekto ne estas tre grava, donas la respondon en la gazeto kelkajn monatojn pli poste, ol la demando estis farita.

Al s-ro N. en Vilno. La vorto „bezonesti“ estas kunmetita tute regule, kaj Vi povas ĝin uzadi. Sed entute ni konsilas pli uzadi ĉiam formojn simplajn anstataŭ kunmetitaj. Kunmetado de vortoj estas karaktere eco de la lingvo germana, kaj al tiu ĉi lingvo ĝi efektive donas grandan riĉecon de formoj; sed en nia lingvo la vortoj pleje estas pli naturaj kaj pli bonsonaj se ili estas ne kunligataj, sed uzataj aparte.

# Anoncoj.

## Nomaro

de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto,  
kiuj eliris ĝis Marto 1891.

№	Nomo de l' verko:	Kosto:
1.	D-ro Esperanto. Mejdunarodni Jazik. Predislovie i Polni Učebnik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono rusa) . . .	15 kopekoj
2.	— Język Miedzynarodowy. Przedmowa i Podrecznik Kompletny. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono pola) . . .	15 kop.
3.	— Langue Internationale. Préface et Manuel Complet. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono franca) . . .	20 kop.
4.	— Internationale Sprache. Vorrede und Vollständiges Lehrbuch (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono germana) . . .	20 kop.
5.	R. Geoghegan. Dr. Esperanto's International Language. Introduction and Complete Grammar. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono angla) . . .	20 kop.
6.	D-ro Esperanto. Malgranda vortaro de la lingvo Esperanto (kun antaŭparolo) por Rusoj . . .	3 kop.
7.	— por Poloj . . .	3 kop.
8.	— por Francoj . . .	3 kop.
9.	— por Germanoj . . .	3 kop.
10.	— por Angloj . . .	3 kop.
11.	D-ro Esperanto. Dua Libro de l' Lingvo Internacia (verkita <b>en</b> la lingvo <b>Esperanto</b> ) . . .	25 kop.
12.	D-ro Esperanto. Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia ( <b>en Esperanto</b> ) . . .	10 kop.
13.	Hanez. Safah achath lekulanu (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea) . . .	20 kop.
14.	A. Grabowski. La Neĝa Blovado. Rakonto de Puŝkin ( <b>en Esperanto</b> ) . . .	15 kop.
15.	L. Einstein. La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems. Vorwort, Grammatik und Styl nebst Stammwörter-Verzeichniss nach dem Entwurf des pseudonymen Dr. Esperanto . . .	50 kop.
16.	N. N. Rusa traduko de la „Dua Libro de l' Lingvo Internacia“ . . .	25 kop.
17.	D-ro Esperanto. Plena vortaro rusa-internacia . . .	1 rublo.
18.	N. N. Rusa traduko de la „Aldono al la Dua Libro“ . . .	10 kop.
19.	A. Grabowski. La Gefratoj. Komedio de Göthe ( <b>en Esperanto</b> ) . . .	15 kop.
20.	L. Einstein. Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. Volapük und Lingvo Internacia . . .	25 kop.
21.	D-ro Esperanto. Meza vortaro internacia germana . . .	25 kop.
22.	Henry Phillips, Jr. An Attempt towards an International Language by Dr. Esperanto translated by Henry Phillips Jr., a secretary of the American Philosophical Society. Together with an english-international vocabulary compiled by the translator . . .	50 kop.
23.	Hanez. Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea-germana . . .	20 kop.
24.	G. Henriclundquist. Dr. Esperanto's Internationelt Sprak (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono sveda) . . .	20 kop.
25.	A. Demonget. Internacia ou Volapük? par Léopold Einstein, traduction de Auguste Demonget . . .	25 kop.
26.	E. de Wahl. Vortaro Esperanto-hispana. . .	3 kop.
27.	G. Henriclundquist. Vortaro Esperanto sveda . . .	3 kop.
28.	Klubo Nurnberga. La Lingvo Internacia. Vollständiger Lehrgang der internationalen Sprache nebst Wörterbuch zum Gebrauche für Deutsche. Herausgegeben vom Nürnberger Weltsprache-Verein . . .	25 kop.
29.	R. Libek. Starptautiska Valoda (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono latva) (Lettisch) . . .	60 kop.
30.	Kolekto da novaj verkoj ( <b>en Esperanto</b> ), kajero No. 1 . . .	25 kop.
31.	Adresaro de la Esperantistoj, kajero No. 1 . . .	10 kop.
32.	Marietta Frollo. Vortareto Esperanto-rumana . . .	3 kop.
33.	Chr. Nielsen. Laerebog til det internationale Esperantosprog. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono dana) . . .	25 kop.
34.	M. S. Bogdanov. Pulen učebnik za svetski ut jezik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bulgara) . . .	50 kop.
35.	Dr. D. Marignoni. Esperanto ossia la piu pratica delle lingue internazionali. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono itala) . . .	25 kop.
36.	J. Rodriguez Huertas. Gramática de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hispana) . . .	20 kop.
37.	A. Grabowski. Kondukanto internacia de l' interparolado kun modeloj de leteroj ( <b>en Esperanto</b> ) . . .	30 kop.
38.	A. Zinovjev. Mejdunarodni jazik „Esperanto“ (la tuta eldono estis senpage dissendita) . . .	
39.	Fr. Vl. Lorenc. Uplna učebnice mezinardni reči dra. Esperanta (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bohema) . . .	25 kop.
40.	D. Gurevič. Sefer hamilim Esperantis (Vortareto hebrea-esperanta) . . .	20 kop.
41.	L. Zamenhof. Vsemirni jazik Esperanto. Polni učebnik s 2 slovarjami (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Rusoj) . . .	10 kop.
42.	<b>Vollständige methodische Grammatik</b> , Formenlehre u. Syntax der internationalen Sprache <b>Esperanto</b> von Ludwig Meier, kgl. b. Hauptmann a. D., geprüfter Lehrer der modernen Sprachen, Vorstand der „Societo Esperantistoja Munhen“ in München. München, Augustenstrasse 89. Im Selbstverlag des Verfassers . . .	60 s.

**Wörterbuch**  
der  
internationalen  
**Esperanto-Sprache**  
Deutsch-international.  
Meza vortaro germana internacia povas esti ricevata de  
presejo de **W. Tümmel, Nürnberg.**  
... Kosto 50 pfenigoj. ...